2.ª Ep. AÑO VIII N.º 42 (178) MARZO - ABRIL 1970



DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

30.ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Ĉefenirejo de la Liceo de Mieres, Kongresejo de la 30.ª Hispana Kongreso de Esperanto okazonta de la 18.ª ĝis la 23.ª de julio de 1970

BOLETIN DE LA FEDERACION
ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Director:
Domingo Martínez Benavente
Redacción y Administración:
Inés Gastón
Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, dcha.
ZARAGOZA

ADRESOJ

Hispana Esperanto-Federacio:
Prezidanto:
S-ro Angel Figuerola Auque
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16
Generala korespondado:
Sekretario:
S-ro Manuel Figuerola Palomo
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º
MADRID-16
Monsendoj:
Kasisto:
S-ro Raimundo Ibáñez Crespo
Str. Princesa, 78, 2.º
MADRID-8
Ĉekkonto: N.º 24.692/10,
Banco Ibérico
Avda. José Antonio, 18
MADRID-14
Sendaĵojn pri statistiko kaj informado al:
S-ro Salvador Aragay
Str. Bassegoda, 40, 3.º, 1.ª
BARCELONA-14
Libroservo kaj Eldona-Fako:
F-ino Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35, 4.º, dcha.
Ĉekkonto: N.º 17917, Banco Bilbao
ZARAGOZA
Jarkotizo por eksterlando: 120 ptojn.

De Secretaría

La Junta Directiva de H.E.F., en su reunión ordinaria de 28 de febrero, considerando de suma urgencia la necesidad de establecer una Secretaría Central con carácter permanente en Madrid, acordó crear un fondo para la adquisición de un local en propiedad, destinado a dicho fin, con aportaciones voluntarias de esperantistas y simpatizantes. Estas aportaciones serán hechas por la cantidad mínima de 500 pesetas, no existiendo inconveniente en que varios interesados reunan pequeñas contribuciones para cubrir la cantidad fijada. Periódicamente, aparecerán en el Boletín de H.E.F. listas de los donantes con las cantidades por ellos entregadas. El fondo se situará en una cuenta corriente bancaria especial de la Federación, y ha sido iniciado con 10.000 pesetas, aportación hecha por la Junta Directiva de H.E.F.

Oportunamente recibirán todos los socios y entidades esperantistas boletines adecuados para verificar las aportaciones.

Esperamos que esta iniciativa, dada su importancia, sea bien acogida entre los asociados y las personas interesadas en el progreso del movimiento esperantista español.

El Secretario de H.E.F.,
M. FIGUEROLA

deziras korespondi

FRANCUJO. — 68-Riedisheim, 4 rue de Champagne, Fino. Lucienne Serville, deziras korespondi kun hispana samideano 20-30 jaraĝa, por praktiki Esperanton.

ĈEĤOSLOVAKUJO. — Strakonice I, Podébradova 826 Inĝ. Kindl Jaroslav, deziras interŝanĝi bildkartojn, ktp. kun hispanaj samideanoj.

ĈEĤOSLOVAKUJO. — Humpotec, Mónesora 963, S-ro Jirí Fiŝar, 18 jaraĝa deziras korespondi kun hispana esperantisto.

GERMANUJO DR. — 90 - Karl - Marx - Stadt W 33, W. Wolff-Str. 13, S-ro Rud. Süss, 81 jaraĝa deziras korespondi kun hispana esperantisto.

Mendu jam:
Afiŝojn de la 30-a H.E.K., 10 ptoj. unuo.
Poŝtkartojn de la 30-a H.E.K.. 3 ptoj. unuo.
Glumarkojn de la 30-a H.E.K., folieto ses glum., 3 ptoj.
Glumarkojn de la 55-a U.K., folieto dek glum., 10 ptoj.
Poŝtkartojn de S.I.A., deko, 10 ptoj.
Kovertojn kun teksto: Esperanto, Internacia Lingvo aŭ Esperanto La Lengua Internacional, deko, 5 ptoj.
Esperanto-insignojn, glueblajn, rondajn, ovalajn kaj stelformajn, 10 ptoj. unuo.
Esperanto-insignojn, pinglajn kaj butonajn, rondajn kaj stelformajn, 8 ptoj. unuo.

El Presidente de H. E. F. ante la celebración del XXX Congreso Español de Esperanto en Mieres (Asturias), del día 18 al 23 del próximo Julio, expone sus impresiones sobre lo que él espera que sea el Congreso, y a su vez invita a asistir al mismo a todos los Esperantistas Españoles.

Creo que sea fenómeno general en cuantos asistimos al XVI Congreso Español de Esperanto, en Gijón, el que todavía subsista en el fondo de nuestra alma, a modo de huella imborrable, la impresión de Asturias.

El recuerdo de nuestra estancia en Gijón, en Oviedo, en Covadonga, ante la Santina, y en cada uno de los lugares visitados para contemplar sus paisajes, los vestigios de su arte y las manifestaciones de su cultura, y gozar el atractivo de la belleza de sus bailes y sus canciones; para recibir las palabras de bienvenida y de felicitación por aquel Congreso inolvidable; para saborear los excelentes platos de la exquisita cocina asturiana y sus deliciosas sidras, no ha sido destruido por la acción del tiempo a pesar de los casi 15 años transcurridos.


De ahí que, al brindarnos la celebración del XXX Congreso Español de Esperanto en la laboriosa villa minera de Mieres, la oportunidad de volver a la ubérrima tierra asturiana y ponernos de nuevo en contacto con su naturaleza, con su arte, con su cultura y, sobre todo, con sus hombres poseedores de una peculiar personalidad que es resultado de la coincidencia en ellos de un conjunto de virtudes, entre las que destacan su sana alegría, su sincera hospitalidad y su indomable energía, uno se siente estimulado a renovar la experiencia vivida una vez y a invitar a todos los esperantistas españoles a que participen también en ella asistiendo al Congreso.

El entusiasmo de los esperantistas de Asturias por todo cuanto se relaciona con el Esperanto; el interés que han puesto los esperantistas de Mieres para lograr que se celebre en esta villa el próximo Congreso Español de Esperanto, tercero de los congresos nacionales de Esperanto organizados en Asturias; la buena acogida dispensada por las autoridades municipales a la iniciativa de los esperantistas, y el programa de actos que se está preparando, permiten suponer, sin lugar a duda, que el éxito del Congreso está de antemano asegurado. Sin embargo, para gararantizarlo y corresponder al esfuerzo y desvelos de sus organizadores, se hace necesario que todos los interesados envíen cuanto antes su adhesión al Congreso.

Es muy importante tener en cuenta, que entre los actos programados están incluidos, según es costumbre, la Asamblea General de la Federación Española de Esperanto y las reuniones de sus Secciones, actos reservados, naturalmente, a los congresistas federados; y que la asistencia a esas reuniones constituye la ocasión propicia y el medio más adecuado de que disponen los miembros de la Federación para hacer llegar a la Junta Directiva y al conocimiento de todos los socios, sus preocupaciones por los problemas que tiene planteados la Federación o por los que puedan planteársele, para aportar, buscar o discutir soluciones a los mismos, y también para presentar posibles quejas y recomendaciones. Añádase al interés que estas reuniones ofrecen siempre para los federados, el que puede representar el hecho de que este año, la Junta Directiva de H.E.F. se propone llevar a la Asamblea General un proyecto de programa de trabajo para discutirlo, enmendarlo y aprobarlo si procede, a desarrollar durante el período de 4 años que va a durar el mandato de la actual Junta.

La consideración de cuanto queda expuesto en torno al XXX Congreso Español de Esperanto y al marco natural, cultural y humano donde va a celebrarse, produce la impresión de que el Congreso, salvo imprevistos, resultará, para quienes asistan al mismo, por su atractivo y su interés, un acontecimiento memorable. Animado por esta halagüeña impresión de lo que yo creo va a ser el XXX Congreso Español de Esperanto, invito a todos los federados y demás esperantistas españoles, así como a los simpatizantes con el Movimiento Esperantista, a que se adhieran y asistan al Congreso, donde todos juntos procuraremos armonizar el deleite de nuestro espíritu con un trabajo eficaz para difundir el valor real de nuestro propósito.

Angel FIGUEROLA



MANKO DE LABORISTOJ MINACAS RASAPARTISMON

Ĉar konstante nesufiĉa estas la nombro de kvalifikitaj laborantoj en Sudafriko, tial ĉiam pli kaj pli malfacile estas por la tiea registaro konservi sian politikon de rasapartismo. Tion raportis la Ĝenerala Direktoro de ILO al la Internacia Labor-konferenco en Ĝenevo (Svislando).

La raporto substrekis, ke ekonomiaj bezonoj trudos al la sudafrika registaro la neceson "enkonduki vastan programon edukan kaj trejnan por la enloĝantoj neblankaj por eviti, ke la ekonomian disvolviĝon de la lando bremsu manko de kvalifikita laborantaro. Politiko, kiu celas daŭrigi la nunan ekonomian kreskon, sed samtempe translokigi grandan parton de la aktivaj loĝantoj neblankaj en "indiĝenujojn"... baziĝas sur memkontraŭdiro, kiu reflektiĝas la fundamentan dilemon en la ideo de "aparta evoluo".

NOVA BRULAĴO POR JETOJ

Grupo da junaj esploristoj francaj kaj alĝeriaj de la politekniko en El Harrach (Alĝerio), sub gvido de uneska eksperto, sukcesis funkciigi turbinon per likva metano. Krom la evidentaj avantaĝoj de tia aranĝo por gasprodukta lando, kiel Alĝerio, uzo de tiu brulaĵo konsiderinde malpliigos la pezon kaj la funkcikostojn de motoro.

Testoj faritaj en la termodinamika laboratorio en El Harrach kredigas, ke metano tre verŝajne valoros kiel estonta brulaĵo por supersonaj aviadiloj.

Fondita en 1963 helpe de Unesko kaj la Disvolva Programo de UN, la politekniko en El Harrach instruas estontajn inĝenierojn pri elektroniko, kemio, minado, inĝenierteknikо mekanika kaj civila, k.s. Nunmomente ĝi havas ĉ. 500 studentojn.

ENCIKLOPEDIOJ EN LA POŜO

Post nur kelkaj jaroj ne necesos al studento dediĉi horon post horo por traserĉi volumojn en sia loka konsultbiblioteko. Li povos hejmen porti en la poŝo tutan enciklopedion, plus vortaregon —kaj laŭplaĉe unu-du romanojn por distra horo! Kaj ĉio ĉi dank'al "ultraslipo", plej lasta evoluaĵo de mikrofilma teknologio, kies pedagogiajn sekvojn oni nun esploras ĉe la universitato de Denver (Usono). Sur ultraslipo (film-karto 5 x 5 cm) eblas reprodukti ĝis 9.000 presitajn paĝojn.

USONA KAMPANJO POR ELIMINI ANALFABETECON

Nuntempe en Usono pli ol 3 milionoj da plenaĝuloj estas analfabetaj, kaj pli ol duono de la senlaboraj junuloj 16- ĝis 21-jaraĝaj suferas pro praktika analfabeteco. Tre ofte signifas tio vivon de mizero, fremdiĝo al la socio, kaj foje krimo.

Urĝan kampanjon por elimini tiun socian malsanon el Usono baldaŭ lanĉos la usona ministerio pri klerigo, kunlabore kun pedagogoj, leĝfarantoj, komercistoj, industriistoj kaj civitaj organizaĵoj tra la mondo. Laŭ la Kleriga Ministro, ĝi estos "multe pli malfacila afero, ol surlunigi astronaŭtojn!"

PROJEKTO POR BREMSI ELMIGRON DE SCIENCISTOJ

Grava problemo por la evoluantaj landoj estas, ke iliaj plej kapablaj sciencistoj emas migri al landoj pli riĉaj, tiel ke ĝuste ilia foresto bremsas la disvolvon de la hejma lando. Lastatempaj esploroj indikas, ke tre grava faktoro, kiu akcelas la migremon de tiuj sciencistoj, estas, ke ili ofte ne povas en sia propra lando sekvadi sian fakon kaj konstante ĝisdatiĝi pri la lastaj esplortrovaĵoj.

Por helpi al la evoluantaj landoj konservi siajn sciencistojn, la Internacia Centro pri Teoria Fiziko en Trieste (Italujo), sub gvido de Unesko kaj de la Internacia Atom-Energia Organizo de UN, enkondukis sistemon de "asocia membreco". Laŭ tiu aranĝo, elstaraj fizikistoj el la landoj de la Tria Mondo povos pasigi de unu ĝis tri monatojn ĉiujare en Trieste, en kadro de tre aktiva komunumo esplora, kaj tamen resti dum la cetera tempo membro de sia propra instituto aŭ universitato. La nuntempa nombro de asociaj membroj —33 el 18 landoj de Afriko, Azio kaj Latinameriko— venontjare pligrandiĝos. Oni antaŭvidas apartan akcenton al esplorado pri teoria fiziko altenergia, nuklea kaj densmateria. (Laŭ Unesko-novaĵoj kaj Informa Servo de UEA.)



NI HONORU LIN

Mariano Solá Montserrat

Kun granda emocio ni konis la malĝojigan novaĵon:

D-ro Mariano Solá, mortis!!!

Kvankam ni jam estis informitaj pri lia grava malsano, tiu doloriga sciigo lasis en ni, senton de granda malpleno. La Hispana Esperanto-movado perdis unu el siaj plej kleraj pioniroj.

Je la jaro 1908, estante tre juna knabo, li kontaktiĝis kun Esperanto. De tiam lia intereso pri la internacia lingvo kreskis pli kaj pli. Lerninte ĝin, tuj fariĝis aktiva membro de la loka Grupo kaj de la Kataluna Esperantista Federacio, okupis diversajn postenojn kaj gvidis multajn Esperanto-kursojn.

Ellerninte la lingvon, lia aktiveco estis ĉefe dediĉita al la Literatura kampo, same en verso kiel en prozo. Li apartenis al la Lingva Komitato kaj partoprenis en la Internaciaj Floraj Ludoj, jen kiel juĝanto, jen kiel premiito. Dum kelke da tempo li estis direktoro kaj redaktis la revuon Kataluna Esperantisto, multajn artikolojn li verkis, kaj ankaŭ lia kontribuo kiel tradukisto estis tre fekunda.

La esperantista vivo de nia elstara samideano estis daŭra sindediĉo al nia nobla idealo. Li apartenis al la Loka Komitato starigita en Tarrasa —lia naskiĝurbo— okaze de la bonfara entrepreno Esperanto Infanhelpo, favore al la aŭstraj infanoj post la fino de la unua mondmilito.

D-ro Solá partoprenis diversajn Universalajn Kongresojn, kaj de kiam la Esperanto-movado estis reorganizita en Hispanujo kaj la Hispana Esperanto-Federacio fondiĝis, nia eminenta pioniro estis unu el la hispanaj esperantistoj, kiuj prestiĝis niajn Naciajn Kongresojn. La prelegoj de D-ro Solá, same en nacia lingvo kiel en flua Esperanto, kun klara prononco kaj trankvila voĉo —pri Literaturo kiel pri Sciencoj—, ĉiam estis, riĉaj laŭ enhavo kaj poeziaj laŭ la formo, ĉar de poeto estis la sentoj kaj ideoj de nia neforgesebla forpasinto.

Mi estas certa, ke la saman malplenon kiun mi sentas, ankaŭ sentas ĉiuj esperantistoj konantaj D-ron Solá, ĉar kiel mi skribis al lia familio, la generacio al kiu li apartenis malaperas ne lasante ĝis nun, personojn, kiuj tiel lerte, brile kaj sindone anstataŭos ĝin.

PACAN RIPOZON AL LI!!!

Inés GASTON

RECORDANDO

El 18 de febrero de este año de 1970, cuando ya los almendros en plena floración eran como bello presagio de una esplendorosa primavera, Mariano Solá Montserrat dejaba de existir a la veterana edad de setenta y cuatro años, a pesar de su edad y madurez, su clara y lúcida mente se conservaba en plena lozanía. Mas a su sana mente fatalmente no correspondía su delicado y sufrido cuerpo que tuvo que resistir dos dolorosas operaciones quirúrgicas, que soportó con estoicismo y cristiana resignación. Desgraciadamente, cuando la ciencia hubo apurado todos los recursos, la muerte llamó a su puerta por ley fatal de la vida para arrebatarnos para siempre al amigo Marián, como familiarmente le llamábamos cuantos con él tuvimos el goce y placer de compartir una franca y sincera amistad.

Con la muerte de Mariano Solá, Tarrasa pierde uno de sus más preclaros hijos y el movimiento esperantista de Cataluña, España y el mundo entero uno de los más eminentes pioneros. Fue en el añorado Grupo "Lumon" cuando al iniciarme en el esperantismo tarrasense allá por el año 1913 bajo la inteligente guía de Valentín Alavedra, entre mis primeras amistades fue la del llorado amigo Marián que formaban en aquella promoción de jóvenes y estudiosos muchachos como los Figueras, Fainé, Bassó, Oliard, Rocabert, Puig, Rigol, Girona y Ventura, entre otros, que fueron una esperanza para el esperantismo y todas las nobles actividades ciudadanas. En aquella época Solá era casi un adolescente y ya observé en él sus admirables cualidades de simpatía, una modestia y sencillez sin límites, y dotado de un talento tal y una gran cultura que nos cautivaba a cuantos nos honrábamos con su amistad, de la cual nos sentíamos orgullosos. A pesar de ser más joven que yo, le respetaba y le admiraba como a un maestro, de mucho de lo poco que sé de esperanto y otros rudimentos culturales le soy acreedor, ya que él solucionaba mis dudas por lo que le estaré agradecido evocando su memoria.

Era casi un niño cuando a raíz del V Congreso Universal de Esperanto celebrado en Barcelona el año 1909, se generalizó en toda España y particularmente en Cataluña un gran movimiento en favor del idioma internacional Esperanto y Mariano Solá, excelente autodidacta, aprendió el idioma por medio de un pequeño folleto cuyo coste era de diez céntimos y al cabo de pocos meses ya dominaba a la perfección el idioma mundial creado por el doctor Zamenhof, nuestro venerado e inmortal maestro. Y el Esperanto fue la base fundamental sobre la cual se asentaría el bagaje lingüístico que al paso del tiempo habría de hacer del joven esperantista Solá uno de nuestros eminentes políglotas, ya que además del esperanto, del bellísimo idioma castellano y de nuestro idioma materno el catalán, que los hablaba y escribía con bellísima dicción y era un apasionado cultivador de sus literaturas. Conocía asimismo profundamente los idiomas de la culta Europa como son el inglés, el francés y el alemán. Por este último idioma sentía una original predilección y era un lector asiduo de sus publicaciones.

En su peregrinación como embajador del ideal tomó parte antes de la Segunda Guerra Mundial en la mayor parte de los Congresos Universales de Esperanto: en Austria, Inglaterra, Alemania, Checoslovaquia, etc., en los cuales asistió como miembro representante del idioma catalán en el seno de la Academia de Esperanto, integrada por eminentes hombres de ciencia y reconocidos grandes filólogos.

Allá por los años veinte fue redactor jefe de la revista "Kataluna Esperantisto", órgano de la Federación Esperantista Catalana, y como notable anécdota recuerdo, cuando el Congreso Esperantista regional celebrado en Vich en aquella misma época, en la sesión de apertura en la cual estaban representadas todas las autoridades locales: civiles, eclesiásticas y militares, y sin alarde de vanidad y exento de petulancia, defectos y fanfarrias que él detestaba; con sencillez y cautivadora elocuencia, pronunció su magistral discurso en idiomas castellano, catalán y esperanto, cosechando al final de su disertación un atronador aplauso coronado por entusiastas felicitaciones y la consabida firma de autógrafos; mientras se oían frases como éstas: "¡Magistral!" "¡Aquí no hay desperdicio!" "¡Esto es carne sin hueso!"...

Hombre íntegro y de espíritu selecto admiraba la ciencia, la literatura y el arte en todas sus facetas y sentía una gran predilección por la música clásica. Era un lector predilecto de Azorín, de Ortega y Gasset y de André Maurois...

Los domingos, ya de mañana temprano, lo veíamos en la estación en espera de la llegada de los diarios matutinos para fruir en las columnas del

MIA OMAĜO

Kiam mi eklernis esperanton en la jaro 1935 mi ekkonis nian samurbanon S-ro Mariano Solá kiel elstaran esperantiston. De tiam S-ro Solá aperis al mi kiel modesta homo, sen iu ajn ŝato por regado, kun milda karaktero kaj profunda kulturo.

Nur kiam homo kiel Mariano Solá atingas vastan kulturon konscias pri la vanteco de iu ajn regeco kaj fiero, ĉar nur tre kulturita homo kapablas kompreni, ke ĉiuj scioj estas preskaŭ nenio kompare kun tio, kio mankas scii. Nur tre kulturita homo povas kompreni la vantecon de ĉia orgojlo kaj fiero; povas kompreni la ligitecon kun niaj kunvivantoj; ke tion kio ankaŭ ni povas esti, ni ŝuldas al la kolektivo al kiu ni apartenas, el kiu ni estas sablero, eĉ nura ereto, el la sablo de la vivantoj kaj el inter la amaso de tiuj, kiuj jam ekzistis kaj la sennombra multego da ekzistontoj, kiuj sekvos nin sur la vivovojo.

Mariano Solá estis modesta pro tio, ke li jam atingis tian homecon, kian nur la scio kaj la komprenemo povas doni. Laŭŝajne pro sia modesteco li aspektis kiel la aliaj homoj, kun siaj ordinaraj zorgoj kaj revoj. Sed pro kio li diferencis de la aliaj, pro kio anstataŭ klopodi pri ordinaraĵoj kiel ĉiuj, li estis esperantisto? La menso kaj la spirito de ĉiu homo estas misteraj se ili statas fermitaj. Sed Mariano Solá malfermis sian spiriton, malfermis siajn sciojn kaj sian koron dum la paroladoj, kiujn ni esperantistoj povis ĝue aŭskulti en niaj naciaj kongresoj kaj en niaj katalunaj renkontiĝoj. El modesta homo eliris tiaj paroladoj, tiel elokventaj laŭ formo kiel riĉaj je enhavo. Nombraj homoj kun tia oratoreco estus atingintaj la plej brilajn lokojn en la socia regado. Multaj paroladistoj, se ili posedus tian oratorecon suprenirus altrangajn poziciojn. Multaj laŭŝajnaj personecoj postkuras la regpovecon kaj la kolektadon de riĉaĵoj kaj vantas pri tio, kiam tiuj eksteraj riĉaĵoj multfoje precize estas la elmontro de interna vakuo.

Mariano Solá estis tre riĉa spirite. Mi rememoras kelkajn konceptojn pri la arto, kiuj elfluis el unu lia kongresa parolado. Li esence diris: "La plimulto ne komprenas la poezion kiam ĝi eklumigas la naturan pejzaĝon tiel plenan da vivestaĵoj kaj naturaj belecoj. Imagu se ni estus unuafoje vidantaj la sunleviĝon: Kia miraklo da beleco! La naturo donacas imponan trezoron kaj da beleco kaj da riĉaĵoj, sed oni ne rimarkas tion, ĉar tiuj estas abundaj kaj ĉiutagaj".

De alia parolado mi ankaŭ rememoras lian difinon pri la genio: "Geniulo estas tutsame kiel ordinara homo. Ĉiu homo revas pri io, ĉiu homo faras al si grandajn projektojn sed ordinare ĉio restas nur revoj kaj projektoj. Unuj zorgoj estas plenumitaj, aliaj zorgoj alvenas kaj ĉiuj revoj kaj projektoj dronas. Sed estas kelkaj malmultaj homoj, kiuj spite la malfacilaĵojn, spite la kontraŭstaraĵojn, neflankiĝante firme sekvas sian internan mision ĝis ĝia plenumo. Tiuj neoftaj homoj estas la geniuloj".

Mariano Solá kaptis la riĉecon kaj belecon de la naturo, revis pri ili kaj krome konsciis pri la rolo de la homvivo sur la Tero. Li estis vera humanisto, pro homamo fariĝis esperantisto kaj havis la genian persistemon por firme sekvi tiun vojon ĝis la lasta momento.

Mariano Solá. Vi estis inter la sennombraj sableroj de la homvivo ekbrila fajrero sed via fajra spirito ne pereis, ĝi daŭras kaj daŭros lumigante. Vi estis granda homama homo kaj pro tio esperantisto. Dankon!

Giordano MOYA

"Diario de Barcelona" las crónicas de André Maurois, el eminente miembro de la Academia Francesa, del cual era su devoto lector hasta que esta gran personalidad falleció.

Gran enamorado de la naturaleza gozaba del campo y sus bellezas y en su moderno chalet de Torreblanca se extasiaba contemplando su rosaleda y aspirando el aire puro del bosque mientras recreábase con la lectura de una profunda literatura, y cuando ya fatalmente tenía los días de su existencia en este mundo contados, aún le admiré teniendo entre sus manos el reciente y voluminoso libro de José María Gironella "Cien españoles y Dios" y con aquella leve sonrisa tan peculiar suya me dijo: "Un libro que está muy bien". Ocho días más tarde dejaba de existir este hombre íntegro y ejemplar del cual, a pesar de ser ya entrado en años, todavía se podía esperar de su incansable laboriosidad en pro de nobles ideales como el Esperanto, del cual era una figura universal. Este fue en vida nuestro admirable y hoy llorado Mariano Solá Montserrat. ¡Descanse en paz!

Sebastián CHALER ARNAU

LA BLUA BIRDO

Antikvaj legendoj kun sorĉa mistero
Detale rakontis pri "Birdo la Blua";
Ĝi estis birdeto mirinda, sur tero
Nur estis la ino simila, ne plua.
—Kaj ia junulo en revo ĥimera,
Decidis ĝin kapti sen timo danĝera.


Li baldaŭ pretiĝis iradi plenfide
Renkonti la birdon tra tuta la mondo;
Pro tio, unue li ŝanĝis avide
Kreskaĵojn por miel' en paŝtista rondo.
—Kaj iom post iom, venis en arbaron
Ĉiam li kunportis preta la sagaron.

Arbaron li venis kaj ne sen surprizo
Tre baldaŭ li vidis birdon arogantan;
Estis birdo ĉarma —ĉu de Paradizo?...
Ĝi montris fiere geston elegantan.
—Kaj tiam, la homo kun celo ĝin pafis,
Sed, —ho, ve! eraris ĉar birdon ne trafis.

De arbo sur arbon, en granda ĥaoso,
Flugetis la birdo kaj tempo forkuris,
Sed tamen —sen laco eĉ sen ripozo—,
En movo konstanta, pli grandon akiris.
—Kaj tiam, tre dolĉe eksonis murmuro
De fonto proksima kun muziksusuro.

Riveret' petole saltadis kun ĝojo,
Zigzage descendis tra l' bordoj defendaj,
Susure ĝi kantis dum tuta la vojo
Eĉ lekis la ŝtonojn de truoj tre fendaj.
—Kaj jen la revulo sin sentis soifa
Ĉar akvon li trinkis kun plezur' signifa.

La natur' senŝpare regalis la homon
Per ĉarmaj pejzaĵoj kaj ankaŭ kuraĝo,
Sed —tute lamente— al li mankis dormo,
Pro tio —nevole—, li perdis la saĝon.
—Kaj timis perdiĝi pro mank' de kontrolo,
Sed sekvis la vojon sen helpa konsolo.


Tra vojoj enigmaj li iris kun fido
Renkonti la birdon de stranga beleco;
Transpaŝis dezertojn senfinajn por vido
Eĉ valojn kaj montojn de loga verdeco.
—Kaj nur kun deziro tre firme persista,
Li sekvis senlace kun celo insista.

Tre stulte —eĉ naive—, parolis kun bestoj
Ankaŭ kun la cedroj vortojn ŝanĝis li;
La arboj lin vokis; —Stultulo!—, sen vestoj,
Vi marŝas tutnuda! —Kien iras vi?
—Kaj tuje respondis plenfebra la viro:
Kapti bluan birdon, jen mia deliro!

La birdo fariĝis grandega koloso
Ĝi kun la tempo fasanegon similis;
La voĉoj de akvoj kaj tiuj de rozo
Diris lin: —Vagulo!— kaj ili konsilis:
—Ho vi maljunulo de la kapo griza,
Lasu persekuton je bird' paradiza!

La voĉoj kavernaj de neĝ-regionoj
Resonis terure kun eĥo giganta;
La birdon —verŝajne—, timigis la sonoj
Ĉar migris kun urĝo majeste fluganta.
—Kaj venis al loko vere grandioza
Kies alta pinto estis tre kolosa.

Supre kaj malsupre estis densa bluo,
Tiom da, ke li eĉ ne povis rezisti;
—Mistera terpinto ja estis influo
Konfuzi la homon ĉar devis heziti!
—Kaj tiam la birdo en ĉiellazuro,
Kovris horizonton per flug' senmezura.

Post kelke da tempo, paŝtist' en esploro
Serĉadis brutaron tra tiu areo;
Ektrovis blindulon malgajan, kun ploro,
Sensenca, timiga, preta al obeo.
—Li balbutis lingvon eble de aer',
Eĉ vortojn de sabloj —ĉu ne de l' infer'?

Volis la paŝtisto scii pri la viro
Ĉar milde demandis pri sano de lia,
Sed li nur respondis per tremanta diro:
—Ho! mi perdis la vojon post cel' fantazia
Ĉar "Birdon la Bluan", post revo ĥimera
Mi persekutadis kun pafo danĝera.

Manuel DE ELEZCANO

«MICROFONO ESPERANTISTA» DE «LA VOZ DE LEVANTE» en VALENCIA, DUDEKJARAĜA



de maldesktre S-ro J. Devís, S-ino M. Malón, S-ro Beta Frígola, D-ro R. Herrero kaj S-ro E. Vidal Alonso

Jam de la jaro 1949, "Radio La Voz de Levante" en Valencio starigis konstantan ĉiusemajnan esperantan programon, kiu, escepte dum la someraj ripozoj, daŭre funkcias. Ĝi nomiĝas "Micrófono Esperantista".

La programon konsistigas: 1) Duvoĉa mallonga klarigado de la celoj kaj avantaĝoj de la internacia lingvo. 2) Kvinminuta doktrina artikolo pri Esperanto; proksimume, 300 diversaj artikoloj konsistigis tiun programeron. 3) Kvinminuta leciono sub la titolo "Aprenda Esperanto por Radio". 4) Esperantista novaĵaro. Kelkaj melodioj apartigas la diversajn programerojn, kaj "La Espero" anoncas kaj finas la sekcion.

Nia himno estas konata de ĉiuj valencianoj, kaj neniu, en nia regiono, nescias pri Esperanto; ne malmultaj samideaniĝis pro nia elsenda agado.

Pasintan 13-an de februaro, la Valencia Grupo de Esperanto celebris la dudekjaran datrevenon de la fondo de "Micrófono Esperantista" kaj, tiucele, la Prezidanto de la Grupo, S-ro Johano Devís Calpe donacis artan arĝentan pleton al la Direktoro de la Radiostacio, S-ro Vicento Beta Frígola. Ĉeestis S-ino Mikaela Malón, aktuala parolantino de "M. E.", S-ro Emanuelo Vidal Alonso, Administranto de la Elsendejo, kaj D-ro Herrero, kiu, de preskaŭ dudek jaroj redaktas la programon.

S-no Devís esprimis la koran dankemon de ĉiuj esperantistoj pro la nestado de "M. E." en la "V. de L.", S-ro Beta reciprokis, dirante ke la elsenda stabo fieras pri la kultura agado farita de la esperantista programo, kaj emfazis ke ĝi estas la plej malnova sekcio de la Radiostacio, tiel ke la laborantaj esperantistoj meritas omaĝon pro sia obstino kaj konstanteco.

D-ro Herrero reliefigis la senton de dankemo de ĉiuj esperantistaj kunlaborantoj, pro la simpatia apogo de ĉiuj geoficistoj de la elsendejo, kiu ebligas ke iliaj demarŝoj estas farataj kvazaŭ en propra hejmo. Tiu ĝentileco estas taŭga rimedo por ke ĉiuj eksterlandaj esperantistoj uzu la ondojn de "M. E.", pruvante, tiel, al la ĝenerala publiko, ke Esperanto estas vivanta afero.

Post la enmanigo de la pleto al la Direktoro de la radiostacio. Sinjorino Malón regalis la geoficistojn per havanaj cigaroj kaj bombonoj, donaco de la "mikrofonistoj" al tiuj, kiuj tiel simpatie helpas kaj progresigas Esperanton en la valencia regiono.

Tiun intiman ceremonion raportis la ceteraj radiostacioj kaj la valencia gazetaro, kio, kompreneble, konsistigis plian propagandon por nia lingva idealo.

ETERULO

Mieres



Parto de la valo, kie okazos asturiana pikniko honore al la kongresanoj.

Mieres estas industria urbo kaj ĝia loĝantaro estas tre laborema.

Ĝi havas bonajn komunikilojn; krom la fervojo "Vasco-Asturiano", kiu komunikigas ĝin kun la ĉefurbo Oviedo ĉiuhore, kaj tiu "Madrid-Gijón", ĝin trapasas du pliaj minfervojoj (Norde-Suden kaj Oriente-Norden), kiuj komunikigas la minojn de karbo kun la karblavejo, kiun la grava firmo H.U.N.O.S.A. havas norde de la komunumo.

Ankaŭ trapasas la urbon du gravaj ŝoseoj kiuj komunikigas ĝin kun Madrid kaj Gijón. De ambaŭ ŝoseoj oni povas admiri belajn pejzaĵojn.

Tre proksime de la urbo ekzistas belaj kaj mirindaj valoj, kie okazos asturiana pikniko honore la kongresanojn.

La komunumo konsistas el pluraj vilaĝetoj kiuj sin komunikas kun Mieres per aŭtobusoj, en ili oni kulturas ĉiajn fruktarbojn, —pomoj, ĉerizoj, piroj, k.c. estas tre bongustaj—. Ankaŭ estas multaj herbejoj kaj maizejoj.

En Mieres oni celebras plurajn festojn, sed la plej grava estas tiu honore al Sankta Johano, patrono de la urbo. Ĉiu vilaĝo havas sian Patronon kaj en ĉiuj vilaĝoj oni organizas diversajn solenaĵojn por festi ilin.

La popola trinkaĵo de Asturias estas cidro (pomvino), kiun oni konsumas en la tuta regiono, sed speciale dum la regionaj piknikoj. Por tipe trinki cidron oni uzas nur unu glason por pluraj personoj; la cidro devas esti speciale verŝata de la botelo en la glason. Oni prenas la botelon levante la brakon por ke ĝi estu en alto, kontraŭe, la glason —specialan por ĉi tiu trinkaĵo— oni devas preni malalte kaj iomete klinita por ke, la verŝata cidro batu proksime al ĝia bordo. Trinkante la cidron, oni ne devas trinki ĉiom, la restaĵo utilas por purigi la glason.

La cidro estas saniga trinkaĵo ĉar ĝi purigas la renojn. Ankaŭ oni ĝin uzas kiel aperitivon, trinkante ĝin normale, oni bezonas manĝi ion, ekzemple, krustulojn, rostitajn kastanojn, fromaĝon, k.c. Ankaŭ en la hejmoj oni ĝin trinkas; okaze de festotagoj, oni trinkas speciale la bongustan ŝaumcidron.

De Asturias oni eksportas multe da tiu trinkaĵo eksterlanden, ĉefe al Hispan-ameriko.

En Asturias estas pluraj tipaj manĝaĵoj, sed la plej tipa estas la "Fabada", kiu konsistas el faboj, kolbaso, sangkolbaso, lardo kaj ŝinko. Tiu ĉi manĝaĵo ne estas adekvata por ĉiuj stomakoj, ĉar ĝi estas tre forta.

La esperantistoj, kiuj venos al Mieres, havos okazon gustumi ĝin.

S. M. ARDURA

GUSTAVO AD

Ĉijare plenumiĝos la centjara datreveno de la morto de Gustavo Adolfo Bécquer, plej famkonata kaj amata poeto en Hispanujo, naskiĝinta en Sevilla je la jaro 1836-a kaj mortinta en Madrid je la jaro 1870-a.

"Ofte dum la vivo de la grandaj homoj, ilia kontakto kun aŭtentaj valoroj postlasas en ili profundan spuron kaj novan riĉaĵon. Nur la grandaj animoj malkovras ĝisfunde la grandajn valorojn". (De la broŝuro Vojoj de Bécquer, "Bécquer en Veruela".)

Tio okazis al nia poeto premata de profundaj suferoj. Ankoraŭ knabo, la legado de verkoj de grandaj poetoj firmigis lian poezian emon; el tiel diversaj legaĵoj, du estis liaj beletraj inklinoj: Horacio kaj Zorrilla; la supera klasika simpleco kaj la tumulta romantika ekzaltado.

Ĉiam, la Literaturaj verkistoj multe influis sur la moroj de la popoloj; kelkfoje la vivo imitas la arton, alifoje, estas la arto, kiu imitas la vivon, kaj tiel, pasas unu post alia, la malsamaj epokoj de nia Literaturo.

Dum la romantika epoko, ĉiuj junuloj, kiuj revis atingi la famon, iris Madridon serĉante ĝin; sed, Madrid ne estis por Bécquer, tiu paradizo, kiun li revis; kaj du malsamajn vivojn li devis vivi, tiun por atingi sian materian subtenon kaj tiun, kiun li kunportis en sia spirito kaj cerbo. Lia amo al la Naturo kaj la muziko, donis energion al lia delikata spirito, tiu muzika sento vivas en lia verko, kiel melodio apenaŭ sentebla, kiu komunikas al ĝi neimageblan sorĉon.

De tiu febra vivado, dum kiu li forgesis la korpon kaj permesis al la animo ke ĝi flugu ĝis la steloj; de tiu lia deziro ne apartigi tion, kio estas vero de kio nur estas revo, naskiĝis liaj romantikaj "Legendoj", liaj mirindaj "Leteroj el mia ĉelo" verkitaj en Veruela, kien li alvenis por resaniĝo post grava malsano kun la espero reakiri forton per la freŝa kaj saniga vento de Moncayo, kaj kie li trovis ankaŭ pacon por sia spirito. Kaj, kion ni diros pri la "Rimoj"? Ili estas la plej alta pinto de lia gloro. La "Rimoj" de Bécquer estas tradukitaj en ĉiujn lingvojn, ilia beleco estas ĉiama, senfina, ĉar ilin inspiras amo.

RED.

HISPANA LIRIKO

Gustavo Adolfo Bécquer (1836-1870) *rangas inter la ĉefaj figuroj de la hispana romantismo. Imunaj kontraŭ la influo de modernaj tendencoj kaj skoloj, liaj versoj estas ĉiam tre ŝatataj en la hispanlingva mondo. En la libro "Eterna bukedo" troviĝas traduko de lia fama "Cerraron sus ojos" fare de K. Kalocsay. Mia jena provo konservas ankaŭ la asonancan rimon de la originalo.*



ONI AL ŜI FERMAS LA OKULOJN BLINDAJN...

Oni al ŝi fermas
la okulojn blindajn,
kaj la mortotukon
trans la kapon tiras.
Ĉiuj sin elŝovas
el la ĉambro trista;
unuj tute mutas,
kelkaj larmojn viŝas.

La flameto lampa
de la planko brilas,
sur kontraŭan muron
ĵetas ombron litan.
Kaj fojfoje tie
iel sin profilas
la mortinta korpo,
kiu jam rigidas.

La tagiĝo venas,
matenruĝo glimas,
kaj la urbon veke
bruoj mil agitas.
Antaŭ ĉi kontrasto
de mister' transviva
kaj ekzisto luma
morne mi meditas:
Dio, kiel solaj
restas la mortintaj!

De la hejmo ŝultre
venas ĉerko ŝia,
oni ĝin demetas
en kapelo kirka.
La kadavron palan
tie oni ringas
per kandeloj flavaj
kaj per drapoj nigraj.

Vokas al funebro
batoj sonorilaj,
oldulino preĝas
sian preĝon finan;
ŝi la navon krucas,
la pordegoj grincas,
kaj la sankta ejo
en solecon sinkas.

Sonas de horloĝo
la pendolo ritma,
kaj de la kandeloj
flamoj krake flirtas.
Antaŭ la obskuro,
kiu fortimigas,
antaŭ tia tristo,
morne mi meditas:
Dio, kiel solaj
restas la mortintaj!

Sonorilo alte
la ferlangon svingas,
koropreme veas,
adiaŭon signas.
En funebraj vestoj
membroj familiaj
apud la konatoj
kune procesias.

La azilon lastan,
ombran kavon striktan,
faras la pioĉo
en la muro niĉa.
Oni ŝin enfermas
per masono brika,
kaj la funebrantoj
kondolencon diras.

Kun fosilo ŝultre
la tombist' foriras,
sur la vojo kanton
interdente ŝpinas.
Meze de la ombroj
kaj silento sidas.
Jam la nokto falas,
morne mi meditas.
Dio, kiel solaj
restas la mortintaj!

En la longaj noktoj
de la tempo vintra,
kiam la fenestroj
pro la vento vibras,
ĉiun vitron vipas,
kaj la forta pluvo
mi en sol' memoras
ŝin, la bedaŭrindan.

Tie pluvo falas,
eternece siblas;
tie ŝin trabatas
uraganoj fridaj;
tie en la truo
de la mur' humida
eble ŝiaj ostoj
krakas jam glaciaj!

... ...

Ĉu ni estas polvo,
korpo senanima,
nura putrantaĵo...
aŭ transmonden migras?
Mi ne scias; tamen
io ne klariĝas:
ke ni sentas naŭzon,
kaj bedaŭr' nin ŝiras,
ĉar ni lasas solaj,
tristaj la mortintajn!

El la hispana:
Fernando de Diego

LA RAVINO "VIOLADA"

(Aragona Legendo)



La tiama dezerto de «La Violada»

Antaŭ pli ol kvardek jaroj, okaze de kamparaj laboroj por la projekto de R.A.A. (Irigaciado de la Alta Aragono), mi devis ofte viziti la tiam dezertan regionon inter la Huesca kaj Zaragoza provincoj.

Kiu nun vidas tie tiel belajn kampojn, arbaretojn, vilaojn, farmojn, paŝtejojn... tiu ne povas eĉ imagi kia estis tiam tiu vera dezerto, kie oni povus trovi nur rosmarenojn, uleksojn, spartiojn; kie oni povis iufoje aŭdi ne alion ol ventegan muĝadon; kie leporoj kaj kunikloj eksaltadis el la piedoj mem de la preterpasanto; kie bandoj da perdrikoj klare pruvis la preskaŭ neeblecon atingi tiajn forpuŝantajn montetojn.

Iun tagon, komence de julio, mi devis atingi altaĵon, kie oni devis fiksi kvinmetran stangon por niaj topografiaj laboroj.

El Huesca mi venis per fervojo al Tardienta; de tie al Torralba mi rajdis sur ĉevalo. En Torralba oni atendis min. Du kamparanoj devis akompani min. Mulo anstataŭis la ĉevalon; kaj alia mulo portos la longan stangon ĵus pentritan laŭ alternaj blankaj kaj ruĝaj duonmetraj zonoj; ĝi ankaŭ devos porti la ilaron kaj la provizaĵojn.

Dum preskaŭ du horoj ni silente marŝis al okcidento. Proksimume je la oka vespere ni alvenis al la ŝafejo "El Culebrón". Nigraj nuboj amasiĝis super niaj kapoj. Ŝtormo komenciĝis; fulmotondro minacis. Ni apenaŭ havis tempon por enirigi la brutojn en la stalon kaj nin ŝirmi en la ŝafistokabanon. Tuj eksplodis la ŝtormo. Kruĉege pluvas. Tondron sekvas tondrego; ĉiam pli forte, kvazaŭ pli proksime al ni.

La temperaturo rapide malkreskis. Oni komencis senti malvarmon kaj miaj akompanantoj flustre interparolis.

Post ne longe, fajro ekbrilis ĉe la kampara fajrejo.

Ni sidis en la apudaj "kadjeroj" (1). La fajro pliviglıgis nian apetiton; kaj post ne longe ni komencis nian vespermanĝon.

La manĝado kaj, eble pli efike, la vintrinkado kiu ĝin akompanis, malligis la langojn de miaj akompanantoj.

—Ankaŭ kiam mi venis lastafoje al "Culebrón" —diris Jozefo, kiu estis la plej aĝa— fortege pluvis; tiamaniere ke ni devis resti tutajn vesperon kaj nokton ĉi tie.

—Kun kiu vi venis? —demandis Antono, la alia kamparano.

—Tiam ni estis kvar: La apotekisto, sinjoro Tamayo; la veterinaro, sinjoro Simón; la forpasinta ĉefpaŝtisto Claudio kaj mi. Nun mi memoras ke sinjoro Tamayo petis de Claudio ke li rakontu al veterinaro kaj mi la legendon pri "La Violada".

Mi tiam memoris pri la nomo de tiu regiono kaj miavice mi demandis:

—Ĉu vi konas do, tiun legendon?

—Ja jes —respondis Jozefo— sed mi devas antaŭ ĉio klarigi ke sinjoro Tamayo diris ke li ankaŭ aŭdis pri tiu vera okazintaĵo; do ke ĝi ne estas legendo sed aŭtentika historio.



Kiel aspektas nuntempe la sama terpeco.

—Bone —mi rediris— bonvolu rakonti ĝin al ni.

Tiam Jozefo diris:

Komence de la pasinta jarcento, kiam la franca armeo reiris al Francujo, restis en Hispanujo iuj fremdaj militistoj, ne ĝuste francoj sed el diversaj eŭropaj, aziaj kaj afrikaj landoj; dungitaj militistoj kiuj en Francujo ne havis patrujon nek familion nek vivrimedon.

Tiuj eksmilitistoj grupiĝis en iuj provincoj, ĉefe en la nordaj katalunaj, aragonaj kaj Navarra.

En ĉi tiu nia regiono malfeliĉe restis trio da eksmilitistoj. Ili sin kaŝis foje en "La Cueva de Colandrea", foje en "La Virgen del Salz" aŭ en la densa pinaro de Zuera aŭ en "Monte oscuro". Ili sin vivtenis per ĉaso, kortoraboj, minacoj... ĝis finfine la Zaragoza "somateno" (2) forpelis ilin al la provinco Huesca.

Tiam, apud la preskaŭ malaperinta "Reĝa ŝoseo al Huesca", ekzistis bieno, kiu hodiaŭ nomiĝas "Torre de Montoya", en kiu loĝis emeritigita generalo Suárez kun sia familio: Edzino, filino kaj bofilino; ĉi lasta vidvino de Kapitano Suárez, mortinta dum la franca invado.

Rosa Suárez, la tridekdujaraĝa filino estis fortika virino kaj samtempe lertega orgenludistino. Pro tio, dum la bona vetero, ĉiun festotagon ŝi eliris el la patra domo kaj, rajde sur bela ĉevalo, alvenis al la vilaĝo Almudébar, kies paroĥestro estis ŝia maljuna onklo Aurelio; kaj tie ŝi plisolenigadis la diservojn per sia lerta ludado de la bonega orgeno.

Dum la monato septembro de ne bone fiksita jaro, Rosa Suárez voje al Almudébar vidis, proksime de la ŝoseo, grupeton da ŝafistoj, almozuloj aŭ ĉasistoj, kiuj kredeble ŝin vidis.

La duan fojon de tiu renkontiĝo, la ĉasistoj, kiuj estis tri, atendadis ŝin apud la ŝoseo. Per mansigno ili petis de ŝi ke ŝi haltu; kaj tiam ŝi malkovris ke tiuj personoj estis eksmilitistoj dungitaj de la franca armeo.

Ili petis de ŝi ke, returne el Almudébar, ŝi alportu al ili iom da pano.

Tion ŝi faris; sed pri tio ne al onklo Aurelio nek al la familio en "La Torre" eĉ vorton ŝi diris.

Dimanĉon post dimanĉo la afero ripetiĝis: Je la iro al Almudébar, peto; je la reveno, pano.

Sed venis la unua frosto kaj Rosa sin detenis iri al Almudébar; kaj la tri banditoj pensis ke ŝi ion malkovris; kaj samtempe ili ektimis kaj koleriĝis. Tamen, ĉar la loko estis ĉasabunda kaj ĉiutage ĉu per retoj ĉu per kaptiloj ĉu per ĉasputoro aŭ per vizito al kortoj viando ne mankis al ili, ili interkonsentis daŭre resti en la regiono. Nur al pano ili sopiradis.

Venis printempo. Rosa Suárez denove vizitis sian onklon; kaj la banditoj denove havis panon.

Je la unua dimanĉo de junio okazis, ke al la ŝoseo alvenis nur du el la banditoj. Rosa Suárez demandis ĉu la tria estas malsana. La du alvenintaj sincere deklaris ke ilia kunulo devojiĝis antaŭ duonhoro kaj ke ili ne scias kien li iris.

Rosa Suárez plu rajdis; kaj kiam ŝi trapasadis la ravinon kiun oni povas *vidi de ĉi tie, jen la tria bandito. Li sidis* sur roko kaj diris al la fraŭlino ke ŝi bonvolu vindi al li la brakon iomete difektiĝintan pro teren-falo.

Rosa elseliĝis kaj kiam ŝi pensis ke ŝi helpos amikon, ĉi tiu subite kaj rapide ĵetis ŝin teren.

Rosa luktis; terurite ŝi kriis...

La du aliaj banditoj aŭdis la kriojn kaj rapidkure alvenis.

La ĉevalo flaradis la ĵus mortintan korpon de sia mastrino.

Pafo eksonis: Unu el la du alvenintaj banditoj mortigis la forkurantan kunulon. La du konsterniĝintaj banditoj metis sur la ĉevalon la kadavron de Rosa kaj per bridoj kondukis ĝin al la proksimeco de "La Torre".

Poste, sur la loko kie ili enterigis la kunulon, ili metis gipsan ŝtonon, nun malaperintan, sur kiu rapide ili gravuris per tranĉilo: "Ĉi tie estis murdita la virino kiu amikece nin helpis".

Tio, kio okazis antaŭ la murdo donis nomon al la ravino (3).

—Kion al la banditoj? —demandis Antono.

—Oni diras ke du kadavroj kiuj aperis post sep monatoj en la Pirinea montaro, apartenis al ili.

Ĉiu silentis.

E. MAYNAR

---

(1) Kadjero = Hisp.: Cadiera. Apogbenko provizita per deturnebla manĝotableto.

(2) Somateno = Hisp.: Somatén. Civila registara armeo.

(3) Violada = Hisp.: Sekse perfortita.

Kliŝojn ĝentile havigis la I.N.C. (Kultivopretiga Nacia Instituto).

INFORMA SERVO DE UEA

PEN HONORIS ESPERANTO-VERKISTON

La Hungara PEN-Klubo prezentis honor-medalon al la "vivanta klasikulo" de la Esperanta literaturo, d-ro Kálmán Kalocsay. Per tiu honorigo ĝi rekonis la grandan kaj multjardekan laboron de d-ro Kalocsay, kiu per majstraj tradukoj diskonigis la hungaran literaturon en Esperanto tra la tuta mondo. La solenaĵo okazis en la domo de Asocio de Hungaraj Verkistoj. La medalon transdonis la prezidanto de tiu Asocio, konata hungara verkisto László Passuth. Pri la tutviva verkado de Kalocsay parolis redaktoro de "Hungara Vivo", S-ro Mihály Gergely. Sekvis deklamado el diversaj tradukoj de Kalocsay, kaj fine la virina ĥoro de Hungara Esperanto-Asocio prezentis kantojn en Esperanto, inter-alie de Palestrina.

D-ro Kalocsay, membro de la Akademio de Esperanto kaj Honora Membro de UEA, fariĝos 80-jara en 1971. Li ankoraŭ laboras senlace sur la kampo de la Esperantaj literaturo kaj lingvistiko, tradukante kaj re-tradukante ĉefverkojn el la literaturo hungara kaj alilanda kaj partoprenante aktive en la laboroj de la Akademio.

LA PLEJ VENDITAJ LIBROJ

Ĉiujare la Libroservo de UEA —la plej granda Esperanta librovendejo de la mondo— publikigas la rezultojn de statistiko pri libroj venditaj dum la pasintaj 12 monatoj. Ĵus aperis la rezultoj de 1969.

El ĉiuj libroj la plej sukcesa en 1969 estis "La Nobla Korano" (Serio Oriento-Okcidento de UEA, n-ro 10), kiu aperis ĉe eldonejo TK en Danlando. La granda interesiĝo pri tiu ĉefverko de la araba kaj de la monda literaturo jam decidigis la eldonejon prepari duan eldonon. Samtempe la sukceso de la Esperanta traduko havas grandan signifon por la disvastigo de Esperanto en la arabaj landoj.

El fikciaj verkoj, la plej vendata en 1969 estis "Kaŭzakaj rakontoj" de Lermontov. En la originala branĉo de belliteraturo venkis la dua eldono de "La infana raso" de William Auld. "Paŝoj al plena posedo", de la sama aŭtoro, estis la plej legata legolibro. "Privilegia vojo" de Setälä kaj "Ĵamborea lingvo" de J. K. Hammer estis la plej sukcesaj lernolibroj. Inter diskoj, la kantoj de Ramona van Dalsem, "La feliĉo", restis plue ĉe la pinto.

TRIDEK UNU LANDAJ ASOCIOJ

Sudafrika Esperanto-Asocio, fondita en 1962, ĵus aliĝis al UEA. Ĝi estas la 31-a Landa Asocio, kiu ĝis nun aliĝis. (Krome aliĝis tri Fakaj Asocioj.) Samtempe, SEA estas la tria Landa Asocio de UEA en Afriko. La aliaj en Kongo (Kinshasa) kaj Madagaskaro. La aliĝo-peton de SEA la Komitato de UEA aprobis per skriba voĉdono.

Kvankam la sola oficiala lingvo de Sudafrika Esperanto-Asocio estas Esperanto, la Asocio uzas ankaŭ la anglan kaj la afrikansan por siaj eksteraj rilatoj. La bulteno de SEA, "Bona Espero", enhavas tekstojn en ĉiuj tri lingvoj. Laŭ la Statuto de SEA, povas aliĝi al ĝi ĉiu persono, kiu simpatias al ĝiaj celoj kaj pagas la kotizon.

PLI EFIKA INFORMADO

La nacilingvaj dokumentoj de CED (la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo) aperas en presita formo ekde 1970. Per pli bona aspekto ili sendube havos de nun pli grandan efikon ĉe la ricevantoj: internaciaj organizaĵoj, gravaj institutoj, landaj komisionoj por Unesko, grandaj bibliotekoj kaj influ-havaj unuopuloj tra la mondo. La dokumentoj aperas plejparte en la angla lingvo kaj de tempo al tempo en la franca aŭ aliaj lingvoj laŭbezone. Ili pritraktas ĉiujn aspektojn de la Esperanto-movado. La plej novaj dokumentoj, ekzemple, temas pri la Tria Internacia Lerneja Konferenco (en Helsinki), la instruado de Esperanto en lernejoj en 1968-69, universitataj katedroj kaj lektoratoj de Esperanto.

LA SOLVO NE ĈIAM ESTAS SIMPLA

Ankaŭ la lingva problemo ne havas simplan solvon. Fakte necesus paroli pri "lingvaj problemoj". Ekzemple, la lingva problemo, kiun frontas kemiisto en sia laboro, estas tute alispeca, ol tiu de la turisto en fremda restoracio. La lingvaj problemoj de la junularo, la problemo en komerco kaj industrio, la problemo de la instrulingvo en la evoluantaj, ofte multlingvaj landoj, la lingvaj problemoj en multaj aliaj sferoj —ĉio kune formas tre kompleksan bildon. La fina solvo povas ŝajni same simpla, kiel Esperanto mem. Sed la laboro por atingi tiun solvon devas esti kompleksa kaj multflanka.

Tiun kompleksan laboron organizas Universala Esperanto-Asocio (UEA). UEA kreis (en 1952) apartan Centron de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, kiu studas ĉiujn aspektojn de la problemo. Kompreni la problemon estas necesa unua paŝo, se oni volas trovi solvon. UEA havas Centran Oficejon (en Rotterdam), kun deko da profesiaj oficistoj, kiu funkcias kiel "nervo-centro", kiel centra informejo kaj kunordigejo por la tuta Esperanto-movado. Ĝi tenas daŭran kontakton kun trideko da aliĝintaj landaj Esperanto-asocioj kaj kun dudeko da aliaj, kun simila nombro da fakaj asocioj (laborantaj por, ekzemple, Esperanto en la scienco, en juro aŭ inter studentoj), kaj kun individuaj membroj en 86 landoj.

La vorto "Universala" ĉe UEA ne aludas nur al tiu granda nombro de landoj. Ĝi signifas ankaŭ, ke UEA interesiĝas pri absolute ĉiuj sferoj de agado, kiujn tuŝas la lingva problemo. Ĝi signifas, ke UEA estas ankaŭ supertendenca. Se oni volas agi por Esperanto en ĉiuj landoj kaj en ĉiuj fakoj de la vivo, oni ne povas permesi al si la lukson elfermi tiun aŭ alian politikan aŭ religian grupon. Kun 33.000 membroj en ĉiuj kontinentoj, neŭtraleco estas simpla neceso. Nur tiel UEA povas esti organiza ponto inter okcidento kaj oriento, inter la juna kaj pli aĝaj generacioj, inter ĉiuj, kiuj volas iel kontribui al la progresigo de Esperanto.

Per fidindaj dokumentoj kaj gazetaraj bultenoj UEA informadas la mondon pri Esperanto. Per kongresoj, somera universitato, libroj, gazetoj, diversaj servoj kiel tiu de la tutmonda delegita reto, UEA helpas utiligi kaj vivigi la lingvon. Per lernejaj konferencoj kaj bultenoj ĝi helpas instrui la lingvon. Kaj ĝi havas tutan aron da planoj kaj novaj ideoj por la estonteco.

Zamenhof brile solvis la problemon realigi komunan lingvon. UEA frontas la problemon realigi la universalan uzon de tiu lingvo. Por tio ĝi bezonas unuigi la fortojn, la energion kaj la intelekton de ĉiuj, kiuj strebas al tiu celo. La solvo certe ne estos simpla. Sed UEA donas al ni realan ŝancon por trovi ĝin.



BARCELONA

Tago de Zamenhof

La 14-an de decembro, matene, en la sidejo de Esperanto-Grupo "Stelo de Paco", kun ĉeesto de reprezentantoj de aliaj lokaj grupoj, oni solene celebris la 110-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

La prezidanto, S-ro Pau Claramunt, malfermis la feston parolante pri la verko de la kreinto de la Internacia Lingvo kaj pri liaj malfacilaj junjaroj kiuj inspiris liajn noblajn idealojn por ke la komprenemo kaj toleremo regu la homajn rilatojn.

Sekve S-roj Francesc Vilá kaj Ramón Fernández deklamis originalajn poeziojn en Esperanto kaj S-ro Antoni Bohigas recitis trafe poemaĵojn de diversaj aŭtoroj.

La festo omaĝe al nia majstro finiĝis per samideana vermuto.

Sabate, la 20-an vespere, Esperanto-Sekcio de "Klubo de Amikoj de UNESCO" aranĝis ekspozicion de libroj kaj diskoj en Esperanto, kiun oni nombre vizitis.

LA LAGUNA

Esperantista Societo de Tenerifo

Estraro elektita la 14-12-1969

Honora Prezidanto, Juan Régulo Pérez.

Prezidanto, Antonio Ferrer Hervás.
Sekretario, Ana Régulo Rodríguez.
Kasisto, Angel Pombrol Hernández.
Bibliotekisto, Antonio Benítez Hernández.
Membroj: 1. Nicolás Pérez Alvarez.
2. Angel Padrón Benítez.
3. Manuel Luis Dorta.
4. José González Fontes.
Esperantista Societo de Tenerifo - San Agustín, 23. Apartado 53
La Laguna (Tenerife). España/Hispanujo.

VALLADOLID

Translokiĝo de la sidejo de "Fido kaj Espero"

Ni sciigas pere de BOLETIN al ĉiuj hispanaj Esperantaj Grupoj kaj gesamideanoj ke de la unua de februaro, nia sidejo estas en str. Estación, 69, 2.º, dcha.; kien vi devas sendi la tutan korespondaĵon al ni adresotan. Antaŭdankon pro via kunlaboro.

Vespermanĝeto okaze de Semajno de Internacia Amikeco

La 28-an de februaro, en la ĵus inaŭgurita nova sidejo de la Grupo "Fido kaj Espero" je la sepa kaj duono p.m. dudekkvin membroj kaj simpatiantoj kuniĝis apud la tabloj, tre bone preparitaj de niaj ĉarmaj fraŭlinoj, por vespermanĝeti bongustajn manĝaĵojn akompanatajn de la bonegaj vinoj de nia regiono. La Prezidanto D-ro Gil Contreras alparolis la ĉeestantaron kaj klarigis la motivon de tiu-ĉi festeto kaj faris la sugeston celebri venontjare la Semajnon de Internacia Amikeco kune kun reprezentantoj de aliaj nacioj (sugesto tre farebla pro la ekzisto de Universitato) kaj fine per trafaj vortoj prezentis la ĵus elektitan Prezidanton S-ro Díez García, kiu dankinte la vortojn de D-ro Gil Contreras, kun la tuta ĉeestantaro starante tostis esperantlingve por la amikeco inter ĉiuj popoloj. Tiamaniere gaje kaj frate la Valladolida Grupo celebris unuafoje la Semajnon de Internacia Amikeco.

L. Hernández

Celebración de Junta General

El pasado día 22 de febrero, celebró en el nuevo domicilio social del Grupo Esperantista "Fido kaj Espero", sito en la calle de la Estación, 69, Junta General, bajo la presidencia de don Antonio Gil Contreras, Presidente del Grupo. La Secretaria leyó el acta anterior y la Memoria de actividades del pasado año que fueron aprobadas por unanimidad. A continuación el señor Contador dio lectura

de los ingresos y gastos del año pasado, que fueron aprobados y leyó el presupuesto para el año actual. A continuación el Presidente propuso a los asistentes los nombres de la nueva Junta Directiva, quedando aprobada de la siguiente forma:

Presidente, don Angel Díez García.
Vicepresidente, don Antonio Gamboa Sánchez.
Secretario, don Luis Martín Herrero.
Vicesecretaria, señorita Carmen Conde Labajo.
Tesorero, don Luis Hernández García
Contador, don Gonzalo Castañón Marcos.
Bibliotecario, don Mauro López Nalda.
Vocales: don Jesús Hinojal Abia.
don Germán San José Rodríguez.
señorita Clementina Tranque Iglesias.

En el turno de ruegos y preguntas, hubo diversas intervenciones, todas ellas encaminadas a proponer medios para lograr más vigor en el movimiento esperantista local.

Para finalizar, el Presidente cesante, señor Gil Contreras, dio las gracias a la Junta cesante y a todos los socios por su colaboración y cedió la palabra y la Presidencia a don Angel Díez, quien asimismo agradeció este honor y se dirigió a los socios presentes pidiéndoles la ayuda para seguir trabajando en pro del idioma Esperanto.

M. R. Urueña

AVISO

Por dificultades habidas para encontrar alojamiento en Mieres para los participantes en la excursión organizada por la Sección de Turismo de H.E.F., en un mismo hotel, pongo en conocimiento de los interesados que se han reservado 20 plazas en el hotel "Mirador Ayala" a pensión completa y el resto en el "Condestable", donde seguramente tendrá que ser sólo para dormir.

A los señores ya inscritos, o que se inscriban para la excursión, se les dará a elegir por riguroso orden de inscripción.

La diferencia que pueda haber en uno u otro caso en el precio, se arreglará directamente con los interesados.

Inés GASTON

26ª INTERNACIA KONGRESO DE T. E. J. O.

Okazonta en Graz de la 8-a ĝis la 15-a aŭgusto 1970
Adreso de la L.K.K.:

Heinz Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz, Aŭstrujo.

DONATIVOS PARA BOLETIN - 1970

C. Ezquerra	*Barcelona*	150,—
S. Gumá	*Reus*	50,—
J. Sardá	*Reus*	50,—
G.o «Stelo de Paco»	*Barcelona*	50,—
J. Oliveras	*Barcelona*	50,—
E. Hurtado	*Valencia*	50,—
A. Alonso	*Pontevedra*	150,—
J. M.ª Serés	*Cervera*	100,—
E. Pérez	*Zaragoza*	100,—
V. Basset	*B. de Valldigna*	50,—
Sra. Vda. de M. Solá	*Tarrasa*	1.330,—
A. Núñez	*Pamplona*	200,—
A. Costa	*San Mateo*	30,—
E. Calvet	*Tarragona*	20,—
A. García Brañanoba	*Bilbao*	50,—
M. de Elézcano	*Bilbao*	50,—
J. Figueras	*S. Est. de Bas*	50,—
M. Manteca	*Alicante*	50,—
M. Manteca	*Icod de los Vi.*	50,—
S. Arizmendi	*Eibar*	30,—
M. Tarragó	*Almatret*	20,—
A. Pastor	*Bilbao*	50,—
V. Ortiz	*Zaragoza*	41,—
		2.851,—

IOM PRI LA I. F. E. F. KONGRESO EN RIMINI

La urbo kiu gastigos la E-fervojistaron ĉijare estos Rimini. Kvankam urbo riĉa je historio pri kio atestas elstaraj monumentoj, estas nuntempe fama, precipe pro sia belega strando kun pura kaj ora sablo, dekkvin Km longa kaj cent metrojn larĝa, maro ĉiam lazura, ne profunda kaj kvieta, kiu permesas eniri en la akvo sen danĝero eĉ por infanoj.

La urbo de nia venonta kongreso promesas al ni multe da beleco. Belegaj magazenoj de ceramikaĵoj, vestaĵoj kaj ornamaĵoj altiras multnombrajn klientojn. Multaj manĝaĵ-vendejoj garantias al la gastoj bonkvalitajn nutraĵojn. La urbo prezentas belegajn ĉirkaŭaĵojn, mildan klimaton, agrablan gastemon kaj modernajn instalaĵojn; preskaŭ 1500 hoteloj garantias al la vizitantoj trankvilajn feriojn, por malaltaj prezoj.

Rimini estas etruska urbo, la plej ŝatata de Cezaro Aŭgusto. En la 9-a jaro a.K. Rimini fariĝis ĝenerala kvartirejo de la Imperiestro al kiu la dankemaj urbanoj starigis honor-pordegon, kiu ankoraŭ indikas la komenciĝon de la Konsula Emilia strato kaj la finiĝon de la Flaminia strato. Post Aŭgusto, la Imperiestro Tiberio riĉigis la urbon per la grandega ŝtona ponto kun kvin arkaĵoj. Mur-restaĵoj kaj ruinoj de la amfiteatro estas ankoraŭ sugestaj postsignoj de Rimini romia. Nun la urbo estas fama kiel ferioloko; ĉi tie la esperanta fervojistaro esperas travivi neforgeseblajn tagojn.

La kongreso okazos sub la aŭspicio de F.I.S.A.I.C. kaj Dopolavoro Ferroviario. Dum la kongreso oni organizos tri allogajn ekskursojn:

Lundon, la 18-an de majo post-tagmeze duontaga aŭtobusa ekskurso al SAN MARINO (malnova sendependa malgranda respubliko). Prezo: Italaj liroj 800.

Ĵaŭdon, la 21-an de majo matene, duontaga ekskurso per aŭtobuso al RAVENA (urbo de famaj mozaikoj kaj iama ĉefurbo de Itala Regno). Prezo: Italaj liroj 1.300.

Vendredon, la 22-an de majo, tuttaga ekskurso per trajno al BOLOGNA kie oni vizitos aŭtobuse la urbon kaj la ĉirkaŭaĵojn. Prezo: Italaj liroj 3.000.

Laŭ la lasta kalkulo, ĉijare partoprenos la kongreson ĉirkaŭ 40 hispanaj fervojistoj. Tio signifas ke ni atingos la plej altan nombron da partoprenantoj en nia historio pri internaciaj kongresoj.

Ni esperas ke la travivado de tiuj internaciaj kongresoj estos por niaj membroj, morala helpo por puŝi ilin antaŭen en nia E-Movado. Propraokule ili konstatas kiel granda estas la Esperanta Idealo; ĝi ebligas interkompreniĝon al pli ol 700 fervojistoj alvenintaj el dudek diversaj landoj. Preskaŭ ĉiuj, kiuj partoprenas Internacian Kongreson, neniam lasas la emon por Esperanto.

Kvankam la unua limdato por aliĝi al la Kongreso jam finiĝis la 31-an de januaro, krom la pago de 1.500 italaj liroj, oni povas aliĝi al ĝi, ĝis la 30-a de aprilo.

Ni atendas vian aliĝon kaj vi mem konstatos kiel viglaj, amuzaj, instruaj kaj amikaj estas la IFEF-kongresoj.

RIMINI ATENDAS NIN! DO, ĜIS RIMINI!

R. DEVIS

EKSKURSO AL VILAFRANKA DEL PANADES KAJ SANKTA PAŬLO DE ORDAL

Malgraŭ ke la sezono ne estis taŭga por ekskursi, rezultis plenplena sunluma dimanĉa mateno la 16-a de novembro, kiam negranda nombro da fervojistaj geesperantistoj, trajne forvojaĝis el Barcelona por ĝui unutagan ekskurson al Vilafranka del Panadés kaj Sankta Paŭlo de Ordal, organizitan de H.E.F.A.-estraro.

En kelkaj stacioj kie la elektro-motorvagona trajno haltis en sia duhora veturado, atendis por akompani nin, la diversajn esperantistajn geamikojn. Tio faris ke alvenante al Vilafranka —unua celo de nia vojaĝo— la grupo estis jam sufiĉe multenombra por allogi la atenton de la vilafrankanoj.

Gvidate de S-ano Manuel Nin kaj Ricardo Sans —viglaj esperantistoj de tiu urbo— kiuj bonvenigis la fervojistan grupon sur la stacia kajo, ni rigardadis la ĉefajn mirindaĵojn de la urbo, inter kiuj troviĝas: Vin-muzeo, urbodomo, romia vojo, ŝoseoj kaj ĝardenoj, ĉampan-kelo, k.t.p.

Fininte ĉi tiun agrablan kontakton, ne nur kun la kulturarto de Vilafranka, sed ankaŭ kun ĝiaj gastigemaj bonkoraj loĝantoj, tre gaje kaj babileme la ekskursantoj reiris vojon, ankaŭ per trajno, ĝis "Lavern Suvirats" —la plej proksima trajna-haltejo de la vilaĝo "San Pablo de Ordal"— kie S-ano L. Hernández Izal, feliĉa posedanto de la unua E-muzeo de Hispanujo, akceptis nin kun granda ĝojo kaj samtempe surprizite pro la neatendita multenombra vizitantaro.

Atinginte San Pablo de Ordal, la E-fervojistoj direktis sin rapide al la loko de la muzeo. En ĝi ni admiris kaj foliumis riĉegan E-librokolekton, multnombrajn tutmondajn kolorajn bildkartojn, bultenojn, revuojn, k.t.p.

Neniam ni vidis tiel gravan kolekton, pri Esperanto, kia estas tiu, kiun posedas nia tre laborema samideano al kiu tiom, ni la E-fervojistoj, ŝuldas pro lia helpado al nia movado.

Post la neforgesebla kaj agrabla vizito ĉe Hernández Izal, je la dua horo posttagmeze, en restoracio de la sama urbeto ni tagmanĝis; post ĝia finiĝo, nia prezidanto S-ro Giménez, per viglaj kaj saĝaj vortoj, dankis al S-ano Hernández kaj al lia edzino, ilian sindonan akcepton kaj akcentis la neceson, ke inter la hispana esperantistaro, oni povus organizi pli ofte, similajn renkontiĝojn por plialtigi la esperantistecon inter la gesamideanoj. La ĉeestantoj premiis nian prezidanton per varma kaj vigla aplaŭdado. Fine oni kantis "La Esperon".

Reveninte al Barcelono tute kontente, la ekskursantoj deklaris al S-ro Giménez sian deziron partopreni baldaŭan ekskurson kaj renkontiĝon kun aliaurbaj geesperantistoj.

J. CEREZO

NOTO. — Tre volonte ni akceptos invitojn por interŝanĝi dimanĉan viziton kun aliaj E-grupoj. Nia oficiala adreso estas: Ronda San Antonio, 46-50, 2.°, 4.ª, Barcelona-11.

✳ Ni legis por vi...

"La Lando de Alvargonzález". Antonio Machado. Tradukita de Fernando de Diego. 48 paĝoj. Eldonita de Hispana Esperanto-Federacio. Zaragoza (Hispanujo). Prezo 50 ptoj.

Mi ne havis okazon legi en la hispana tiun verkon de Antonio Machado (legu Maĉado) kaj mi opinias ke leginte la tradukon de Fernando de Diego, ne estas necese ke mi legu ĝin, ne tial, ĉar la tradukinto estas plena garantio de ĝusteco, sed ĉar la tuta teksto fluas tiel nature, ke mi senhalte atingis la finon neniam bezoninte, kiel en aliaj verkoj, malplekti versojn pro la netuja kompreneblеco estigita de iaj sinonimoj kaj malkutima vortordo. Male, "La lando de Alvargonzález" estas romanco, kies versoj sinsekvaj esprimas la sinsekvajn erojn de la rakonto, nature kaj klare kiel en bona prozo.

Legante ĝin, ŝajnas al mi ke mi reaŭskultadas tiun rapsodon, kiu en mia knabeco patose prirakontis krimon helpante sin per tiu kvadrata tolo, plena je bildoj, kiujn li per longa vergo indikadis laŭ la fazoj de la krimrakonto! (Vidu la prezenton, p. 12).

La ĉefa trajto de la verko estas la asonancaj rimoj, kutimaj en la hispanaj romancoj, maloftaj en Esperanto. Fernando de Diego, per poezia, inteligenta vortelekto elpruvis, ke tiu rimformo meritas internacian aplikadon.

En la Glosoj mankas la nomo Juan (Ĥŭan) = Johano, Aŭstera kaj Bravuro. Ne ŝajnas necesaj la vortoj *romantismo, romantisma,* p. 9 kaj 11, ĉar laŭ Pl. V. *romantiko* ja estas romanticismo.

En p. 18 *kuŝis sin sur tero.* Ne tiel! Ĉar *kuŝi* estas netransitiva; kaj en la antaŭparolo de S-ro H. Vatré p. 7, mi trovis novigon: *iam "endos" traduki,* kiu laŭ la teksto volas signifi "oni devos" aŭ "estos necese". Mi ne scias pravigi ĝin, kaj tial ĝi aperas al mi kiel simpligo malsimpliga. Aliflanke montriĝis unu plian fojon, ke la limo inter A kaj E estas ne klare difinita; p. 6, antaŭparolo: *li publikigis versojn originale aŭ tradukite.* La demando estus, ne kiel li publikigis versojn, sed kiajn versojn li publikigis; do, *originalajn aŭ tradukitajn.*

Simile, sed inverse, p. 11: *mortis sola kaj forlasita.* En soleco? Do *sole.* Estante forlasita? Do *forlasite.* Simile en p. 31 kaj 36: *tutkovritA, armitA* ansta-

taŭ *tutkovrite, armite* ĉar la gerundioj aktiva kaj pasiva gramatike estas samkarakteraj.

La majstreco de Antonio Machado kaj la kompetenteco de Fernando de Diego plene koincidas kun pozitiva rezulto en la verko "La Lando de Alvargonzález" por ke vi, legantoj, nepre akiru tiun juvelon de la hispana kaj Esperanta literaturoj, por vi eldonitan de nia Federacio, klare presitan, kaj ilustritan.

Salvador GUMA

"Ni, homoj..." Kolekto da rakontoj esperante verkitaj de Zora Heide, kun mallonga biografio pri la aŭtorino. Frontpaĝan desegnon de Stjepan Soriĉ. Kontrolita de la Literatura Komitato SAT. Kopirajto ĉe Dansk Esperanto-Forlag. Abyhøj. Danlando. 1969. 69 paĝoj, 14,5 x 21 *cm. Prezo* 90 *pesetoj.*

Zora Heide, jugoslava esperantistino nun loĝanta en Danlando, regalas nin per sia kolekto da rakontoj. Unu el ili, Avo Martin, estis tradukata en islandan lingvon kaj voĉlegata en la radio de Rayjkjavik. Ŝi akiris duan premion ĉe la itala literatura komitato kaj laŭdan mencion en 1969 ĉe internacia literatura konkurso en la Universala Kongreso de Helsinki.

La nuna verko konsistas el ses rakontoj, ĉefe el ŝia hejmlando. La unua, Volupto, impresas pro sia forta temo, preskaŭ nekredebla. Sed, ĉio povus okazi inter ni, homoj...

La dua, Epizodo, estas simpla sed kortuŝa okazaĵo, same kiel Avo Martin.

Dukatoj montras kial oni povas perdi sian veran feliĉon por ne forlasi la gepatran grundon kaj kutimojn.

Amika malamiko, travivaĵo de piloto kiu falis vundita sur fremdan teritorion dum milito, kaj Instruistino Teresa, inde finas la rakontojn, kiuj havas interesajn temojn, en bona literatura kaj flua stiloj.

J. DEVIS

GLASGOW. — Plurkolora turisma informilo pri tiu konata urbo de Skotlando. Ĝi estas faldformata kaj belaspekta; pluraj fotografaĵoj montras la belecon de tiu regiono.

Per mallongaj kaj trafaj frazoj ĝi prezentas la diversajn aspektojn de la urbo, kun la plej allogaj kaj rimarkindaj lokoj.

Eldonis ĝin, Scottish Tourist Board, 2 Rutland Place, Edinburgh, 1.

BIBLIO KAJ ARKEOLOGIO. — Informa broŝuro pri la Biblia Muzeo de Antikvaĵoj en Amsterdam. Ĝi enhavas informojn pri la celo, konsisto de la Muzeo kaj bezonataj sciigoj por viziti ĝin. Gvidado kun eksplikc france, angle, germane kaj en Esperanto.

RIPOZOJ. — Ek de januaro 1970 la 52-paĝa, lukse ilustrita esp. revuo RIPOZOJ reaperas, enirante en sian sesan jaron. En ĉiu numero ĝi dediĉos paĝojn al la internacia esp. movado. Landaj asocioj, fakaj organizaĵoj, lokaj societoj, delegitoj de UEA kaj aliaj estas petataj sendi al la Redakcio de la revuo informojn pri sia agado kaj sukcesoj.

Adreso: RIPOZOJ, b-do Tolbuhin 51, Sofia, Bulgarujo.

ESPERANTA HEROLDO. — Organo de Esperanto-movado en Slovenio, en nacia lingvo kaj Esperanto. Redaktas S-ro Dezidérij Mizerit. Nova bulteno.



ESPERANTO PAROLATA

De la jaro 1958-a, S-ro M. Rétot, en adresaro kiu aperas en UNIVERSALA REVUO kaj kies titolo estas "Esperanto-Parolata", kunigas nomojn kaj adresojn de samideanoj, kiuj scipovante Esperanton, laboras en hoteloj-restoracioj, en ĉiuspecaj vendejoj, oficejoj, transportoj, k.t.p., kaj kies servojn oni povas peti, tute ne ĝenante ilin, okaze de difinita bezono, trapasante ilian urbon.

Baldaŭ la Hispana parto de la adresaro estos reeldonata (7-a eldono). Kiel por la aliaj landoj, li atendas de la hispanoj informojn pri novaj adresoj, kaj korektoj. Por esti praktike utila (ĉu al vojaĝantaj samideanoj ĉu al esperantistoj kiuj emas doni la preferon al esperantistoj) la adresaro devas enteni abundajn adresojn.

Pliajn informojn pri kio temas, petu de S-ro M. Rétot, II boulevard Davout, Paris-20.



55 CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO

VIENA, 1 - 8 AGOSTO 1970

Viaje organizado por la Sección de Turismo de la Federación Española de Esperanto en colaboración con Viajes Meliá.

30-7-70 Por la mañana, salida de Madrid o Barcelona en avión "T" a Ginebra. Una hora más tarde, aproximadamente, llegada a Ginebra. Cena y alojamiento en el hotel.

31-7-70 GINEBRA. Media pensión en el hotel.

1-8-70 GINEBRA. Desayuno en el hotel. Por la mañana, salida en avión JET "T" para Viena. Dos horas y media más tarde, llegada a Viena. Cena y alojamiento en el hotel.

2-8-70 al 8-8-70 VIENA. Medias pensiones en el hotel.

9-8-70 VIENA. Desayuno en el hotel. Por la mañana, salida en avión de regreso a España. Con escala en Zurich, llegada por la tarde a Madrid o Barcelona.

Precio del viaje por persona en Hotel 1.ª B, habitación doble con baño:

De Madrid	18.910 Ptas.
En habitación individual con baño	20.976 "
De Barcelona, en habitación doble con baño	17.741 "
En habitación individual con baño	19.807 "

Inscripción e informes en todas las Delegaciones de Meliá en España y en la Sección de Turismo de la Federación Española de Esperanto. Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza.

EXCURSION TURISTICA A MIERES CON MOTIVO DEL 30 CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

16-7-70 Por la mañana, salida de Zaragoza en autopullman hacia Bilbao, visitando VITORIA, donde se almorzará. Por la tarde, llegada a BILBAO. Cena y alojamiento en el hotel.

17-7-70 BILBAO. Desayuno en el hotel. Salida hacia Santander. SANTANDER. Almuerzo, cena y alojamiento en el hotel.

18-7-70 SANTANDER. Desayuno en el hotel. Salida hacia Mieres. MIERES. Cena y alojamiento en el Hotel "Ayala".

19-7-70 al 23-7-70 MIERES. Medias pensiones en el hotel.

24-7-70 MIERES. Desayuno en el hotel. Salida hacia Burgos, visitando LEON, donde se almorzará. BURGOS. Cena y alojamiento en el hotel.

25-7-70 BURGOS. Desayuno en el hotel. Salida hacia Zaragoza, visitando SORIA, donde se almorzará. Por la noche, llegada a Zaragoza.

Los hoteles y restaurantes de camino, serán de 1.ª B, en habitaciones con baño.

Precio de la excursión por persona en habitación doble...	3.904 Ptas.
Precio de la excursión por persona en habitación individual	4.120 "

Informes e inscripción, en la Sección de Turismo de la Federación Española de Esperanto. Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza.

Al igual que el viaje a Viena, esta excursión está organizada en colaboración con Viajes Meliá.

IIª FRANCA-HISPANA ESPERANTO RENKONTIĜO

okazonta en Jaca (Ĥaka) 27-28 junio 1970

Ĉar la Renkontiĝo okazos samdate kun la ĉiujaraj, tradiciaj festoj de Jaca, dum kiuj okazos diversaj aranĝoj kulturaj, folkloraj aŭ simple popolaj, ĝis nun ni ne fiksis programon por sabato kaj dimanĉo —27-a kaj 28-a—, vespere, pro ebla partopreno en la ĝeneralaj urbaj festoj.

H.T.E.S. eldonos broŝurojn pri Jaca en Esperanto, okaze de la Renkontiĝo. Ricevas la aliĝojn kaj la monon: Hispana Turisma Esperanto-Sekcio de H.E.F., ĉe Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza (Hispanujo).

30ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Organizita de la Hispana Esperanto-Federacio
Okazonta en Mieres (Asturias) de la 18-a ĝis la 23-a de julio 1970.
Adreso de la Organiza Komitato: Str. General Sanjurjo, 11, Mieres.

Presidente, don Cándido Cienfuegos; Vicepresidente, don Manuel Ardura; Secretario, don Carlos Ortega; Vicesecretario, don José de la Fuente; Tesorero, don Jaime Huelga; Vocales, don Juan León, doña Elena Vigil, don José Luis Miranda, señorita María Lourdes Fraile, señorita Puri López, don Carlos García, señorita María José Fernández, señorita Denia González, señorita Angelines Corredera, don Emilio Vergara, don Valentín Briz.

55ª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Okazonta en Vieno de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1970

Sub la Alta Protektado de
D-ro Franz Jonas, Prezidanto de Aŭstrujo

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

GRAVA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

La dimanĉon, 26-an de aprilo, okazos en Perpignan la jara Kongreso de la Esperanto-Federacio "Languedoc-Rousillon". Jen estas la antaŭvidota programo:

— je 10 h 30: labora kunveno ĉe la Metia Ĉambro, 35, quai Vauban, sub la prezidanteco de S-ro René LLECH-WALTER;
— je 12 h 30: komuna manĝaĵo ĉe la restoracio de "La Loge", apud la Urbdomo de Perpignan;
— je la 3-a posttagmeze, okazos prelego pri "Finnlando, la lando de la 60.000 lagoj". Tiu prelego estos prezentota de ge-roj BENAZET el Argelès-sur-Mer per tre belaj diapozitivoj.

Por pli ampleksaj informoj kaj aliĝoj, sinturni al S-ro René LLECH-WALTER, 5, quai Vauban - 66 - PERPIGNAN. Tel. (69) 34.38.84.

TIP. C. BOLOIX.-REINA FABIOLA, 7.-ZARAGOZA

D. L. Z. - 375 - 63